

☆ BRAZILA ☆

# REVUO ESPERANTISTA

Elirante ĉiumonate—Apparecendo mensalmente

## REDAKCIO

Alberto Alvares F. Vieira—Reinaldo F. Geyer—Everardo Backheuser

## ENHAVO (SUMMARIO)

Aos Nossos Leitores.

La Bapto—Coelho Netto kaj João Keating.

**Congresso Brasileiro de Esperanto** (Brazilia Kongreso de Esperanto).

Raporto pri la Vortaro—Arlindo de Souza.

Raporto pri la Oficiala Organo—R. F. Geyer kaj Daltro Santos.

Projekto pri Lingvaj Reformoj—E. Backheuser.

Kroniko.

Concurso do Brazilia Klubo «Esperanto».

Korenuo—Julia Lopes kaj Katinja.

Sekreta Malbono—Raymundo Correia kaj Daltro Santos.

Esperanto Praktika.

Lingvaj Aferoj.

ELDONO DE

**M. PIEDADE KAJ K.º**

Rua da Assembláa, 46—Rio de Janeiro

BRAZILUJO

# BRAZILA REVUO ESPERANTISTA

Assignatura annual (12 numeros). . . . . 3\$000

Jarabono (12 numeroj). . . . . 6 frs.

Um exemplar, 400 réis.

Por ôiuj aferoj ; kunlaborado anon-  
coj, abonoj, sciigoj, informoj. k. t. p.  
rekte sin turni al la Redakcio de la

**Brazila Revuo Esperantista.**

46, RUA DA ASSEMBLÉA, 46  
RIO DE JANEIRO—BRAZILUJO

Para todos os assumptos: collabora-  
ção, annuncio, assignaturas, noticias,  
informações, etc., dirigir-se directame-  
mente á Redacção da

**Brazila Revuo Esperantista.**

46, RUA DA ASSEMBLÉA, 46  
RIO DE JANEIRO—BRAZIL

## GRUPOS ESPERANTISTAS

1906 — *Marto* — G. E. Suda Stelaro — Campinas.

*Junio* — Brazila Klubo «Esperanto» — R. dos Ourives, 85, (1º  
— Rio de Janeiro.

*Septembro* — Esp.-Societo Sud-Rio-Granda — Sete de Setembro,  
Porto Alegre.

*Oktobro* — G. E. de Niteroi — R. Marquez do Paraná, 60, Niteroi,  
» — G. Verda Stelo (*Komercoficistoj*) — Ourives, 85, Rio

Janeiro.

*Decembro* — Laboristara Grupo Esperantista — R. Hospicio, 145-1º  
— Rio de Janeiro.

1907 — *Aprilo* — G. Verda Signo — S. Christovão — Rio de Janeiro.

*Majo* — G. E. de Petropolis — Petropolis.

» — G. E. Zamenhof — Santos.

» — G. E. Cachoeiro de Itapemerim — Espirito Santo.

Al la sekretarioj de grupoj en Portugallingvujo ni petas informojn pri  
la movado kaj aliajn sciigojn.

## LISTA DOS AGENTES

P. Genoud — Campinas.

Luiz Nephtaly Antunes — (Casa Ha-  
vaneza) S. Paulo.

José Telles — Ribeirão Preto.

Audio de Souza — Uberaba.

Pintos & C. — Rio Grande, Pelotas  
— Porto Alegre.

José de Paiva Magalhães — Santos.

Coronel João Duarte da Silveira —  
Hotel Bragança, Petropolis.

Paes & C. — Bello Horizonte.

Antonio da Costa — Ouro Preto.

Almeida & Irmão — Bahia.

J. Martins — Belém-Pará.

Ramiro M. Costa & Filhos — Recife.

Militão Bivar — Ceará.

Annibal Rocha & C. — Curityba.

Paschoal Simoni — Florianopolis.

Viagante — J. Athayde Marcondes.

Ekster Brazilujo oni abonas nian  
*Revuon* ĉe *Tra la mondo*, 15, Bou-  
levard des Deux Gares, Meudon  
(Francujo).

Fóra do Brazil assigna-se a nossa  
*Revista*, em *Tra la mondo*, 15, Bou-  
levard des Deux Gares, Meudon  
(França).

A *Brazila Revuo Esperantista* respeita religiosamente as crenças e opi-  
niões de todos os seus redactores e colaboradores, e até conserva sem tocar,  
os seus sistemas de graphar as palavras.

ASSIGNATURAS

DE

Jornaes e Revistas Nacionaes e Estrangeiras

*Encommendas de Livros de*

*Portugal, Hespanha, Allemanha, França, Italia, etc..*

**A LIVRARIA LUSO BRASILEIRA**

DE

**M. Piedade & C.**

encarrega-se mediante modica commissão

**Rua da Assembléa, 46**

**RIO DE JANEIRO**

---

---

**ABONILO**

*Mi abonas unu jaron de la «Brazila Revuo Esperantista» komencante de la unua numero.*

**BONVOLU ADRESI AL:**

Sro. ....

Strato ..... N. ....

Nrbo ..... Lando .....

*Aldonite vi trovos poŝtmandaton*

da ..... por la pago de l' jara abono.

Subskribo :

.....

# OBRAS SOBRE DIREITO

## A LIVRARIA LUSO-BRAZILEIRA

possue um grande e variado stock de livros sobre direito, dos mais distinctos juriconsultos nacionaes estrangeiros, livros esses que vende pelos preços dos editores, encarregando-se da expedição pelo Correio sob registro, acondicionados, livre de porte.

### A SAHIR:

O DECRETO N. 1 641 DE 7 DE JANEIRO DE 1907, *sobre expulsão de estrangeiros do territorio nacional*, ligeiramente commentado e precedido de alguns capitulos doutrinarios sobre o fundamento juridico e applicação pratica do direito de expulsão e com referencias aos autores nacionaes e a jurisprudencia patria, pelo DR. PAULO LACERDA DE ALMEIDA, illustrado lente da Faculdade Livre de Direito do Rio de Janeiro e advogado nos auditorios da mesma cidade.

1 volume brochado 5\$, encadernado 7\$000

<b>Lafayette</b>	— DIREITOS DAS COUSAS, 1 vol. enc.....	30\$000
»	— DIREITOS DAS FAMILIAS, 1 vol. enc.....	30\$000
»	— DIREITO INTERNACIONAL, 2 vols. enc.....	35\$000
<b>João Monteiro</b>	— APPLICAÇÃO DO DIREITO, 1 vol. enc. 18\$, br.	15\$000
»	» — DIREITO DAS ACÇÕES, 1 vol. enc. 7\$, br....	5\$000
»	» — UNIVERSALISAÇÃO DO DIREITO, 1 vol. en. 8\$, br.....	6\$000
»	» — THEORIA DO PROCESSO CIVIL E COMMERCIAL, 3 vols. br. 30\$, enc. em 1 vol. 34\$, enc. em 3 vols.....	38\$000
<b>Lacerda de Almeida</b>	— OBRIGAÇÕES, 1 vol. enc. 22\$, br....	20\$000
»	» — PESSOAS JURIDICAS, 1 vol. enc 12\$, br.	10\$000
<b>Paulo de Lacerda</b>	— CONTRACTOS DE CONTAS CORRENTES, 1 vol. enc. 17\$, br.....	15\$000
»	» — CONTRACTOS DE ABERTURAS DE CREDITO, 1 vol. enc. 17\$, br.....	15\$000
<b>Bento de Faria</b>	— NULLIDADE EM MATERIA CRIMINAL, 1 vol. enc. ....	12\$000
»	» — MARCAS DE FABRICA, 1 vol. enc. 15\$- br..	12\$000
»	» — PROCESSO COMMERCIAL E CIVEL, 1 vol. enc.	10\$000
»	» — PRATICA POLICIAL, 1 vol. enc. 7\$, br....	5\$000
»	» — TRADUÇÃO DOS ELEMENTOS DE DIREITO ROMANO DE MACKELDEY, 1 vol. enc. 15\$, br.....	12\$000

Pedidos a M. PIEDADE & C.

46, RUA DA ASSEMBLÉA, 46

RIO DE JANEIRO

— Porte Gratuito —

☆ BRAZILA ☆  
**REVUO ESPERANTISTA**

---

Redakcio: Alberto Alvares F. Vieira -- Reinaldo F. Gever -- Everardo Backheuser

---

## Aos nossos leitores

No relatorio sobre o orgão official dos Esperantistas no Brazil, a ser apresentado ao Congresso de Esperanto, será dito que todos os grupos e clubs devem de uma maneira directa auxiliar a *Brazila Revuo Esperantista*. A nossa Revista não se envergonha de tambem directamente vos vir pedir esse auxilio.

Temo-nos esforçado por apresental-a bem feita e bem acabada, quer quanto á parte intellectual—e aqui aproveitamos o ensejo de agradecer aos nossos devotados collaboradores—quer tambem quanto á parte material. A *Brazila Revuo* tem se mostrado, nos parece, digna da nobre causa do Esperanto. E' justo, por outro lado, que os esperantistas brasileiros a auxiliem de todo modo. Um delles, e o mais simples, é angariar assignaturas. O preço da assignaptura annual da *Brazila Revuo* é phantasticamente barato, dadas as condições de mão de obra no Brazil e especialmente no Rio de Janeiro. Não haverá, pois, ninguem que se negue a assignar o nosso jornal desde que um esperantista o peça.

Pois bem, nós ainda fazemos uma vantagem: *A toda a pessoa que obtiver para a nossa Revista 6 assignaturas nós daremos uma nova assignatura de graça.*

A Direcção.

# LA BAPTO

(Verkis COELHO NETTO)

Dornoj de la malglataj montoj, dornarbetoj kaj ŝtonegaroj de la virgaj vojoj, iom post iom, prenis iliajn vestojn. Preskaŭ nudaj, la piedoj sangantaj, la haroj kreskintaj, jen dormante sub la plenlumo de la puraj steloj, sur la altaj suproj malvarmaj, jen ekokupante la malsekajn kavernojn, — ŝi, kuntiriĝinta, preĝante en la fundo de la malhela abismo, li, observante eksterre, aŭskultante la arbarajn bruojn kaj la folian kraketon, ĉiam atendante ian kruelegan batalon kontraŭ la sovaĝa besto, mastro kaj posedanto de la malseka kaverno.

Erarante ili vojiris, forkurante la venĝon de severmora nobelo — simple tial, ke ŝi estas la unua naskitino de nobelo, kaj li, apenaŭ rapsodo.

Ili forkuras, ĉar sin reciproke amante iliaj koroj pekis.

Tio, kio iom trankviligas ilin dum la plej malĝojaj horoj estas la rideto de la infano, kiun, jen la patrino kunportis sur la brakoj, apud la brusto, jen la patro karesis tre alpremante ĝin al la koro.

Dum tiu ama vojaĝo tra la neesploritaj dezertoj, ili vivadis, kiel barbaroj sin nutrante per fruktoj, krom la infano, ĉar por ĝi ĉiam estas lakto.

Iun nokton, haltante sur senakva kaj senfrukta monto nuda kaj seka, la malfeliĉa patrino rimarkis, ke la infano ektemas. Tragedia antaŭsento malkvietigis ŝin :

— Rapide, Alcindoro...

— Rapide! Akvon! mia kara, ĉar la malgranduleto mortigas.

— Akvon! ekkriis la rapsodo, ĉirkaŭrigardante maltrankvile la tutan nudan monton.

— Jes! Rapide! Rapidege... por bapti ĝin!

La infaneto agoniis sub la ĉielaj palaj lumoj.

Alcindoro saltegante, malsupreniris la monton kaj alvenis al la rando de l'barbaro, serĉante riveron, fonton el kiu li ĉerpus malmutege da akvo.

Malfeliĉa Alcindoro !

En la arbaro ne estas ia akva flueto ! Nenia postsigno de rivereto en la tuta ĉirkaŭaĵo !

\*  
\* \*

Post duonhoro revenis la eraranta rapsodo. Kun verda folio, malrapide, paŝo post paŝo por ke li ne perdu la multekostan trovajon.

— Hedvigo, jen estas. La tuta akvo, kiun mi trovis en la arbaro : du rosogutojn sur folio...

— Estas malfrue, Alcindoro, la malgranduleto ne ekzistas plu !

— Ĉu ĝi foriĝis senbapta ! Idolano ! ?

— Trangviliĝu, mi baptis ĝin. Vi ne trovis fonton en la arbaro, mi trovis ĝin tre proksime. Rigardu, mi tute malsekigis ĝin.

— Kaj, kie vi eltrovis la fonton, Karulino ?

— En la koro : — mi baptis ĝin per larmoj.

*Tradukis*—JOÃO KEATING.

\*  
\* \*

**Coelho Netto**, tão querido no Brasil, de que é uma das glórias literarias, é já vantajosamente conhecido no mundo esperantista, o qual abrange hoje mais de cinquenta nacionalidades e trinta e poucas linguas diversas.

Além dos contos a que nos temos referido, publicados no *Esperantiste* e no *Tra la Mondo*, estamos informados de que em 1901 a *Lingvo Internacia*, órgão central dos esperantistas, inseriu a tradução da «Buena Dicha», vertida depois para o russo e publicada num jornal de grande tiragem.

A *Brazila Revuo Esperantista* orgulha-se em apresentar hoje aos esperantistas o delicado conto «O Baptismo» que, certo, agradará tanto como «A Lágrima de Noiva», já mais popular talvez no *Esperantistujo* que no proprio Brasil.

## CONGRESSO BRASILEIRO DE ESPERANTO

A treze do corrente realizar-se-á a sessão inaugural do primeiro Congresso Brasileiro de Esperanto. Será brilhantissima, pois a commissão organizadora envidou todos os esforços para garantir-lhe o bom exito.

Foram convidados S. Excs. os Srs. Ministros de Estado, os quaes prometteram assistir ao menos á sessão solemne de abertura. A sala das reuniões publicas é o grande e bello salão da Associação dos Empregados no Commercio; tem elle espaço para cerca de mil pessoas.

Em outra sala dessa sociedade, que da melhor vontade e generosamente vem prestando auxilio á nossa propaganda, será organizada a exposição de toda a sorte de documentos esperantistas.

Arranjar-se-ão varias secções, assim discriminadas provisoriamente :

1<sup>a</sup> **Litteratura** : Serão ahi expostos todos os livros literarios, traducções de autores de varias nacionalidades, mostrando pela melhor forma possivel, que os principaes literatos podem desde já ser lidos por intermedio de nossa lingua, desde o grego Aristophanes até o francez Coppée, o inglez Morton e os brasileiros Coelho Netto e Machado de Assis.

2<sup>a</sup> **Sciencia** — A importante revista *Internacia Sciencia Revuo* e outras obras scientificas evidenciarão aos visitantes que nossa lingua perfeitamente se presta para tudo, sem exceptuar os difficeis inventos technicos.

3<sup>a</sup> **Pro Esperanto** — Todos os *instrumentos* de propaganda, como as «chaves», em diversas linguas de Ĉefecê e o *Premier Manuel*; as brochuras e folhetos de propaganda; livros importantes como os dos Srs. Couturat, Lafargues, etc., ver-se-ão ahi. Alem destes, grammaticas, vocabularios e alguns outros



livros de estudo. Os Srs. Piedade & C., editores da grammatica em portuguez de Alberto Vieira e Leonel Gonzaga, e o Sr. Murrillo Furtado, autor de um bom manual, organizarão uma secção para a venda dessas uteis brochuras.

4ª **Esperanto para cegos** — Nossos amigos Almeida Junior e Reinaldo Geyer serão os organizadores dessa parte da exposição onde mostrarão a revista *Esperanta Ligilo*, além de outros livros impressos em relevo e cartas de cegos de grande numero de paizes. Almeida Junior é professor no Instituto Benjamin Con- (para cegos), sendo cego elle proprio. Geyer felizmente não é cego, seu coração é porém tão grande, seu amor pelos infelizes tão intenso, que resolveu aprender o systema de Braille para se corresponder com os cegos, dando-lhes alguns instantes de prazer.

5ª **Commercio** — Todos os documentos bons para introduzir o esperanto no Commercio serão vistos nessa secção. Não se hão de esquecer os nomes das firmas brasileiras, ou de fora, que correspondem por meio de nossa lingua.

6ª **Jornaes e revistas** — Ao longo dos muros ver-se-ão nossos jornaes e revistas. De tal modo serão arrançados que verificarão facilmente os visitantes como em quasi todos os paizes do globo terrestre o esperanto é preconizado por revistas especiaes. Por outro lado haverá as revistas que advogam uma causa determinada, *Espero Pacifista*, *Espero Katolika*, *Socia Revuo* e outras mostrarão como o Esperanto serve para todas as propagandas.

7ª **Firma Hachette**—A bella offerta de livros e revistas, que ao nosso Congresso fez a conhecida firma parisiense Hachette, editora de numerosas collecções de livros em esperanto, será exposta em lugar á parte, onde serão distribuidos exemplares da bellissima *Revuo* e do *Primeiro Manual*, com tal fim enviados.

8.<sup>a</sup> **Tra la Mondo**—O Sr. Montrosier, o activo redactor do *Tra la Mondo*, a revista esperantista illustrada de maior circulação, enviou ao Congresso, como informamos aos nossos leitores, documentos de toda especie e que na exposição deixarão patente, a grande simpatia que vota ao nosso paiz e á nossa propaganda brasileira. Serão distribuidos exemplares do *Tra la Mondo*, principalmente do numero que traz o artigo ácerca do «Rio de Janeiro» para que se convençam todos que por patriotismo se deve auxiliar a propaganda da lingua internacional.

9.<sup>a</sup> **Cartões postaes** — Os cartões postaes recebidos das cinco partes do mundo são curiosidades sobre o ponto de vista da propaganda. Uma vez que outra encontramos pessoas que não comprehendem que possamos corresponder-nos com coreligionarios de Vladivostoque ou da Finlandia, dos quaes até nos tornamos amigos. Os que tem inclinação para a fraternidade humana... ou que apreciam as collecções de cartões postaes illustrados terão prazer em verificar como o Esperanto preenche bem os dous fins. Chegou-nos ha dias do Chile, de nosso experimentado samideano Sepúlveda Cuadra, um bello cartão-viajante, e aproveitamos o ensejo para reter em nossa exposição esse excellent *amikigilo* dos Esperantistas.

10.<sup>a</sup> **Jornaes brasileiros**—Todos os jornaes contendo artigos ácerca ou a favor do Esperanto ou nelle escriptos farão parte desta secção.

Encerrada a exposição serão enviados ao Congresso de Cambridge.

O Sr. Couto Fernandes, actual presidente do *Brazila Klubo*, possui um album original, onde colleccionou todos os artigos, inclusive pequenas noticias, publicados nos jornaes do Rio de um anno para cá (de Maio de 1906).

E' possivel arranjam-se outras secções para documentos de outra ordem, as que enumeramos são no entanto as principaes.

A sessão inaugural, como já referimos, dar-se-á no dia 13, ás 3 horas da tarde, no salão nobre da Associação dos Empregados no Csmmercio.

Antes dessa, porém, que será solemne e honrada com a presença das mais altas autoridades do paiz, realizar-se-á uma outra, no dia 12, para a escolha da commissão directora.

Na sessão solemne, que precederá á exposição, nosso eminente *samideano* Medeiros de Albuquerque fará em portuguez uma conferencia sobre o Esperanto. Para todos que lhe conhecem a dicção facil, essa parte do programma é garantia do exito completo de nossa empresa.

De 14 a 20, trabalharão os esperantistas na discussão dos relatorios sobre «ensino e propaganda», do Dr. Keating, sobre «órgão official» do Sr. R. Geyer e sobre o «dicionario» do Sr. Arlindo de Souza. Os relatorios já promptos, publicámo-los no presente numero; os outros aparecerão no proximo.

Sabemos que o Sr. Backheuser apresentará um projecto sobre as futuras reformas da lingua, a ser enviada á *Commissão Linguistica* do Esperanto, formada dos mais notaveis esperantistas do mundo e com séde em Paris.

Durante o congresso effectuar-se-ão duas grandes festas. A primeira no dia 14 em Niterói: a segunda, a 19, no Rio de Janeiro.

A festa de Niterói consistirá da representação de duas comedias no theatro «João Caetano» e da recitação de poesias esperantistas. O spectaculo, organizado pelo *Gremio Dramatico* e o *Grupo Esperantista*, abrirá com o hymno esperantista *L'Espero*, do Dr. Zamenhof e musica de Gurgulino de Sousa. A Exm<sup>a</sup>. Senhorita Ruth Carvalho dirá o *Kanto de l'Ekzilo* (canção do Exilio); Almeida Junior, a *Preĝo sub la verda standardo* e outros esperantistas, cujos nomes inda não sabemos, recitarão outras poesias.

As duas Comedias que serão representadas são: «Duas linguas», de Domingos Castro Lopes, em dois actos, com alusão aos brasileiros que não querem saber senão de lingua franceza e «Não me fales nisso», da H. X., em um acto e de progaganda.

Começaremos o publicá-la no proximo numero.

A festa do *Brazila Klubo Esperanto*, que encerrará o congresso, realiza-se no dia 21 de Julho (dia do jubileu do Espe-

ranto), no Instituto de Musica. Por não estar definitivamente organizado, deixamos de publicar hoje o programma. Sabemos entretanto que o Sr. Keating, o activo presidente do «Suda Stelaro», fará uma conferencia sobre nossa lingua ; a Exm<sup>a</sup> Sra Rachel Santos dirá «*Aŭdi Stelojn*», o «Ouvir Estrellas» de Bilac traduzido por Daltro Santos, Hernani Mendes o «*Semanto*», o menino Fontenelle o «*Nova Kanto*»; o Sr. Quirino Oliveira compoz a musica para o *Kanto de l'Ekzilo* e o maestro brasileiro, Sr. Francisco Braga outra para «*Ravita*».

Os coros de que são directores o Sr. Quirino e o Dr. Beltrão, cantarão juntos o hymno *L'Espero*, com a musica official do Sr. de Menil, e assim terminará o Congresso Brasileiro no mesmo dia em que, 20 annos antes, o Esperanto entrara no mundo.

## BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

La 13<sup>an</sup> de tiu ĉi monato okazos la malfermo de la unua Brazila Kongreso de Esperanto. Ĝi estos brilega, ĉar ĉiumaniere la organiza komisiitaro agadis por bone efektiviĝi ĝin.

Oni invitis liajn moŝtojn Srojn Prezidanto de l'Respubliko kaj ministroj, kaj ili ĉiuj promesis ĉeesti almenaŭ la malferman kusidon. La salono por la publikaj kunvenoj estas la granda kaj bela ĉambrego de Asocio de Komercoficistoj ; ĝi povas enhavi ĉirkaŭe 1000 personojn. En alia ĉambro de tiu Societo, kiu bonvole kaj malavare konstante estas kelpanta nian propagandon, oni organizos la ekspozicion de ĉiuspecaj dokumentoj esperantistaj.

Ĉe la ekspozicio oni aranĝos diversajn fakojn. Kiuĵ estos plimalpli la jenaj :

1<sup>a</sup> **Literaturo** : oni metos tien ĉiujn librojn literaturajn, tradukojn de la diversnaciaj verkoj, montrante kiel eble plej

bonmaniere, ke la ĉefajn verkistojn jam oni povas legi per la pero de nia lingvo, de la greka Aristofano ĝis la franca Coppée, ĝis la angla Morton, ĝis la brazilaj Coelho Netto kaj Maŝado de Asis.

2<sup>a</sup> **Scienco** — La grava gazeto *Internacia Scienca Revuo* kaj aliaj verkoj sciencaj montros al la vizitontoj, ke nia lingvo perfekte taŭgos por ĉio, eĉ por la malfacilaj teknikaj elpensoj.

3<sup>a</sup> **Poresperanto** — Ĉiuj propagandiloj, kiel la *Ĉefecaj ŝlosiloj diverslingvaj*, la *Premier Manuel*; la broŝuroj kaj folietoj propagandaj; gravaj libroj, kiel tiuj de Sroj Couturat, Lafargues, k. t. p., sinmontros en tiu ĉi fako. Krom tiuj, oni vidos ankaŭ la gramatikojn, vortarojn kaj aliajn verkojn.

Sroj Piedade kaj K<sup>io</sup>. eldonistoj de la gramatiko en portugala lingvo de Alberto Vieira e Leonel Gonzaga, kaj Sro Murillo Furtado aŭtoro de bona lernolibro organizos specialan faketon por disvendi tiujn utilajn librojn.

4<sup>a</sup> **Esperanto por Blinduloj** — Niaj amikoj Almeida Junior kaj Reinaldo Geyer estos la organizontoj de tiu parto de nia ekspozicio, kien ili metos la *Esperanta Ligilo* kaj ĉiujn aliajn librojn punktepresitajn, kaj leterojn de blinduloj el granda nombro da landoj. Almeida Junior estas profesoro en la Instituto Benjamin Constant (por Blinduloj) kaj li mem blinda. Geyer feliĉe ne estas blinda, sed lia koro estas tiel grandanima, lia amo por la malfeliĉuloj tiel granda, ke li decidis ellerni la Braille'a sistemo por korespondi kun la Blinduloj, donante al ili kelkajn momentojn da plezuro.

5<sup>a</sup> **Komercio** — Ĉiuj dokumentoj taŭgaj por enkonduki nian lingvon en la komercistaron estos vidataj tie. Oni ne povos forgesi la nomojn de firmoj brazilaj aŭ eksterlandaj kiuj korespondas esperante.

6<sup>a</sup> **Jurnaloj kaj Revuoj** — Kontraŭ la muroj sin montros ĉie niaj ĵurnaloj kaj revuoj. Kiel eble plej bone oni aranĝos ilin

tiamaniere, ke facile la vizitontoj vidos, ke en preskaŭ ĉiuj landoj de la Terglobo Esperanto estas disvastigata per specialaj ĵurnaloj. Aliflanke la fakaj revuoj, kiel *Espero Pacifista*, *Espero Katolika*, *Socia Revuo*, k. t. p. montros la taŭgecon de Esperanto por ĉiu ajn propagando.

7.<sup>a</sup> **Firmo Hachette**— La bela donaco de libroj kaj revuoj, kiun al nia Kongreso faris la tre konata Firmo pariza Hachette, eldonisto de grandnombra kolekto de libroj esperantaj, estas montrata en speciala montrilo. Oni disdonos ekzemplerojn de la belega *Revuo* kaj de *Premier Manuel* senditajn por tiu celo.

8.<sup>a</sup> **Tra la Mondo**— Sro Montrosier, la agema redaktoro de la tre disvastigata revuo *Tra la Mondo*, sendis al la Kongreso, kiel ni sciigis niajn legantojn en nia lasta numero, ĉiuspecajn dokumentojn, kiuj en la ekspozicio elmontras lian simpatian por nia lando kaj por nia propagando nacia. Ekzempleroj de **Tra la Mondo** estos ankaŭ disdonataj al la ĉeestantoj, precipe la numero, kiu enhavas artikolon pri «Rio de Janeiro», por ke ĉiuj vidas, ke je patriotismo oni devas helpi la propagandon de la internacia lingvo.

9.<sup>a</sup> **Postaj kartoj**— La poŝtkartoj ricevataj el la kvin partoj de l'Mondo estas kuriozaĵoj je la vidpunkto de l'propagando. Tie ĉi aŭ tie kelke da personoj ne komprenas, ke ni povas korespondi kun samideanoj de Vladivostok aŭ de Finnlando kaj eĉ iĝi amikoj. Tiuj, kiuj estas emaj por la homa frateco... aŭ kiuj ŝategas la kolekton de poŝtkartoj ilustritaj ĝojos ekvidante kiel bonmaniere Esperanto trafas ambaŭ celojn. Unu bela rondiranto de nia lerta samideano Sepúlveda Cuadra, el Ĉilio, alvenis al ni antaŭ kelkaj tagoj; ni profitos la okazon por enmeti en la ekspozicion tian bonegan amikigilon de la esperantistaro.

10.<sup>a</sup> **Jurnaloj brazilaj**— Ĉiuj ĵurnaloj brazilaj enhavantaj artikolojn pri-per-poresperantajn formos tian ĉi fakon.

Post la ekspozicio ili estos sendataj al la Kembriĝa Kongreso. Sro Couto Fernandes, nuna prezidanto de la B. K. E. posedas originalan albumon, sur kies paĝoj estas gluitaj ĉiuj artikoloj eĉ malgrandaj sciĝoj, kiuj la ĵurnaloj Rio, aj enpresis de post unu jaro (Majo 1906).

Eble oni aranĝos aliajn fakojn por aliaj dokumentoj; sed la suprecititaj estas la ĉefaj.

La malferma kunsido okazos, kiel ni supre skribis, la 13<sup>an</sup>, je la 4.<sup>a</sup> horo vespere, ĉe la nobla salono de la Asocio de Komerc-oficistoj. Sed antaŭ tiu ĉi solena, honorata per la ĉeesto de la plej gravaj aŭtoritatoj de nia lando, okazos alia, la 12<sup>an</sup>, por la elektado de la estra komitato.

En la solena kunsido, kiu antaŭiĝos al la ekspozicio, nia eminenta Samideano Medeiros e Albuquerque faros portugale paroladon pri Esperanto. Por ĉiuj, kiuj konas lian facilan eldiron, tiu parto de la programo garantias al nia entrepreno plenan sukceson.

De la 14<sup>a</sup> ĝis la 20<sup>a</sup> la esperantistoj laborados en la diskutado de la raportoj pri «lernado kaj propagando» de Dr<sup>o</sup>. Keating, pri «Organo oficiala» de Sro Geyer kaj pri «Vortaro» de Sro Arlindo de Souza. La raportoj jam prezentitaj ni enpresas en tiu ĉi numero. La aliaj aperos en la venonta.

Ni scias, ke Sro Backheuser prezentos projekton pri la estontaj reformoj en la lingvo, sendotan al la Lingva Komitato.

Dum la Kongreso okazos du grandaj festoj. La unua, la 13<sup>an</sup>, en Niteroi, la dua, la 21<sup>an</sup>, en Rio de Janeiro.

La Niteroja festo konsistos el reprezentado de du komedioj en la teatro «João Caetano» kaj de la eldirado de poezioj esperantaj. La spektaklo organizata de la *Gremio Dramatico* kaj de la *Grupo Esperantista* komencos per la himno esperantista *L'Espero*, vortoj de Dr<sup>o</sup>. Zamenhof muziko de Sro Gurgulino de Souza. Fraŭlino Ruth Carvalho eldiros la *Kanton de l'Ekzilo*, Almeida Junior, la *Preĝon sub la Verda Standardo* kaj aliaj esperantistoj, kies nomoj ni ankoraŭ nescias eldiros aliajn poeziojn.

La du komedioj riprezentotaj estas: «Du lingvoj», de Domingos Castro Lopes, duakta, mokanta la brazilojn, kiuj nur volas lerni la francan lingvon kaj. «Ne parolu min pri tio», de H. X., unuakta kaj propaganda. Tiun ĉi ni komencos publikigi en nia venonta numero.

La festo de l'*Brazila Klubo Esperanto*, kiu fermigos la kongreson, okazos la 19<sup>aa</sup> de Julio, la jubilea tago de Esperanto, ĉe la Muzikinstituto. La programo ne estas definitive organizita; ni bedaŭras ne povi ĝin publikigi hodiaŭ.

Tamen ni povas aldoni, ke Sro Keating, la lerta prezidanto de «Suda Stelaro» faros paroladon pri nia lingvo, ke Srino Rachel Santos eldiros "*Aŭdi Stelojn*" poezion de Olavo Bilac tradukita de Daltro Santos; Hernani Mendes, la «*Semanlo*», la knabo Fontenelle "*Nova Kanto*", ke Sro Quirino Oliveira verkis muzikon por "*Kanto de l'Ekzilo*" kaj la muzikestro brazila Sro Francisco Braga ankaŭ alian por "*Ravite*".

La ĥoroj, kies estroj estas Sro Quirino kaj Dro Beltrão, kantos kune la himno *L'Espero* kun la muziko oficiala de Sro de Menil.

Tiel finos la Brazila Kongreso en la sama tago, en kiu, 20 jaroj antaŭe, eniris Esperanto en la mondon.

---

## RAPORTO PRI LA VORTARO

Inter la verkoj por proponi al Brazila Kongreso de Esperanto, sin montras, kiel tiu de granda graveco, pro ĝia malfacileco, pro la penado, kiun ĝi devos prezenti, la organizado de l' Vortaro Portugal-Esperanta.

La prezidanto de l' organizanta komisiitaro de l' Kongreso, Dro Backheuser, senlaca kunbatalanto kaj klera propagandisto, kies nomo estas jam profitege konata ĉe l' esperanta literaturo, disdonigis cirkuferojn, kie li sin turnis al la esperantista mondo, petante ĝian kunhelpon por la efektivigo de tio, kion antaŭ longe



priokupis lian spiriton, tiel doninte pruvon de lia persisteco, subtenante nian famon de civilizita nacio.

Kiam la komisiio kunveniĝis, estis disdonitaj, post la diskutado pri la farota verko, literojn de l' Vortaro al jenaj klubanoj (B.K.E.) kaj komisiitoj: Dro Everardo Backeuser, Couto Fernandes, Leonel Fonseca, Hernani Mendes, R. Geyer, k. a., kiuj ekverkis ĉe la sidejo de l' Klubo.

Malfacila tasko pezis sur la ŝultroj de l' komisiitaro, tial ke tio estas la unua aperonta verko de l' plej granda graveco.

Ne volis la komisiitaro kontentiĝi per tio, kio jam estis farita iom difekte, en la eldonitaj fremdaj vortaroj, ĝi volis transpasi: revidi ĉion, kio estis en la esperantista literaturo (ĉar estas ja tre granda la kolekto de eldonitaj libroj, revuoj, pri ĉiuj fakoj de homaj konoj), kaj entenigi tion en tia verko, por ke ĝi estu kiel eble plej plena. Senutila tasko!

La libera tempo maloftiĝis kaj la limtempo proksimiĝis por la propono de l' verko.

La komisiitaro tute okupegata de multaj aferoj ĉe la socia vivado kaj malgraŭ la elpreno el liaj tagaj okupoj de kelke da horoj, ne povis venki la malfacilaĵojn, kiuj sin prezentis, ne povis kunveni ĉiufoje laŭnecese por la diskutado de tio, kion oni estis prezentinta parte, kaj la verkado restis apenau ekkomencita.

Ni, lacaĵ pro la taga laboro, malmultaj fojoj povis havi la necesegan klarecon de spirito por verko de tia graveco, kiu postulus rimarkindan klerigan helpon, por ĝia alfarado al nia lingvo, ĉar oni devas interpreti vorton post vorton, tial ke ni estis vidintaj kelkaj verkoj erarajn tradukojn aŭ malbone interpretitajn, kaj Esperanto ne akceptas tion pro ĝia racieco.

Kiel, do, traduki vorton logike, precize, kiam al ni mankis bonan bibliotekon kaj tempon? Forigi ian vorton estis kontrastari la idealon del' komisiitaro, traduki ĝin erare estis mensogi al l' idealo de nia lingvo: la racieco, la logiko.

Tiel, ni havas por citi la «esperantismojn», kiel ni havas la anglismojn, la galicismojn, k. a. ni havas ekzemple, la vorton—recepção—Esperante *ricevo, ado*; sed ni diros: *Ĉambro de akce-*

*ptado*; ni diras: deputado, *deputato*, camara dos deputados, o (conjuncto dos deputados) *deputataro*, tamen ni diros: senador, *senatano*, senado, *senato*, k t. p. Ni vidis kreski, tago post tago la malfacilaĵojn cirkaŭ tiu lingvo, ĝiaj gramatikoj dikigas, oni donis al Esperanto sintakson kaj... en fremdlando oni jam priparolis ĝian reformon.

Ĉio tio ekscitis la spiriton de l'komisiitaro, kiu komence, firma, decida, je l'malforteco de ĝiaj unuaj paŝoj imagis venki tiujn malfacilaĵojn, ĉar al ĝi ne ŝajnis tiel grandaj.

La alprenita plano estas kiom eble la plej bona kaj simpla, kaj akorda kun la emo de la lingvo, traduki la vortojn laŭ ilia signifo kaj doni al ili la plej grandan nombron da egal-sencoj. Malgraŭ tio, kaj tio, kion ni estas dirintaj, multe da vortoj ne estis tradukotaj. Pro la internacieco estis enmetitaj multe da vortoj ne troveblaj en la eldonitaj vortaroj, ekzemple —hordo (**hord**, fr., ang., germ., it.), k. a. Forigitaj, tamen, estis aliaj, precipe adjektivoj, verboj, adverboj devenigeblaj de donitaj radikvortoj, kies traduko estas tre facila, por ne dikigi la vortaron.

Pri la vortoj elvenintaj el la greka lingvo ni havis multe da duboj pro la komparado kun identaj vortoj, jen tradukitaj per interpretado kaj jen aliaj per la alpreno de la respondaj grekaj radikoj, ĉe kiuj oni obeis la principojn de transkribado. Ni citos inter aliaj: anónimo, *anonimo* homónimo, *samnoma*, *synónimo* *egalsenca*, *hydrotherapia*, *hidroterapia* kaj *akvokuracado*, *metrópole* *ĉefurbo*, *monopólio* *monopolo*.

Kiel ni diris, la verko estis neplena. Restas, do, al la Kongresanoj proponi la necesegajn rimedojn por la efektivigo de tia idealo.

En Franclando Esperanto jam vivadis antaŭ dek jaroj, kaj ĝiaj vortaroj aperis dum 1905 kaj 1906. Ne estos tromalfrue ke ni ĝin havas dum post du jaroj kiel esperantistoj.

Rio de Janeiro, la 5.<sup>an</sup> de julio de 1904<sup>a</sup>.

ARLINDO DE SOUZA.

## Raporto pri la oficiala organo

Aperas nun la kvara numero jam de *Brazila Revuo Esperantista*, tridekdupaĝa kaj ĉiumonata, dank'al la klopodoj de Sro. Dro. Alberto A. F. Vieira, kiu interesigis por nia afero la eldonistojn M. Piedade & Kio, kiuj prenis sur sin la komercan flankon, kaj al tiuj de kelkaj sindonemaj samideanoj, valoraj helpantoj de la redakcio al kiu apartenas la raportanto.

Kiel estas sciate, B. R. E. sin nomis «oficiala organo de la brazilaj esperantistoj», kio estas nenion signifanta surskribo, ĉar pro tio ĝi ja ne havas ian profiton realan.

Tamen ĉiuj komprenas, ke, por esti vivebla, nia propaganda revuo, kies utileco jam plene montriĝis, tute bezonas la helpon de ĉiuj esperantistoj, kiuj devas certigi la sendependecon de sia organo.

Siaparte, la redakcio de *Brazila Revuo* konstante uzas kaj rekomendas ĉiujn rimedojn por igi pli granda la nombron de l'ankoraŭ nesufiĉaj abonintoj, sed urĝas, ke la brazilaj grupoj efike subapogu ĝian agadon kaj por tio la plej bona vojo estas alpreni la revuon kiel oficialan organon, ĉu individue, ĉu pere de ligo brazila pri kiu en alia raporto io estas parolata.

Tiam, aŭ tia ligo formiĝos nur de l'grupoj, brazilaj kaj portugalaj, aŭ ĝi enhavos ankaŭ apartajn esperantistojn (tio, kion al mi ŝajnas pli praktika, laŭ sistemo de *Belga Ligo Esperantista*), ĉiaokaze la pagintaj ligoj ricevos la oficialan organon, la individuaj aliĝintoj rekte kaj la grupoj aŭ kluboj ope laŭ speciala prezo, sed laŭ komuna prezo se la revuo estos sendota rekte al la grupanoj.

Nature al ĉiuj aliĝintaj grupoj estos rizervita apartan lokon por ĉiuj oficialaj informoj, k. s.

La detalojn pri abonprezo, kiu estas tre malalta, pri kotizaĵo por la ligo, ĉu opaj ĉu individuaj, ni ne povas ĉi tie priparoli kaj ili estas diskutotaj de la Kongreso.

R. FRED GEYER.

M. DALTRO SANTOS.

## PROJEKTO PRI LINGVAJ REFORMOJ (\*)

Ĉu oni devas, en tiu ĉi propaganda momento, reformi la vortaron aŭ plisimpligi la gramatikon de nia lingvo? Ĉu oni devas *studi* la reformojn, por ke baldaŭe aŭ post tre longe oni reformas ĝin?

Mi opinias, ke ni ne devas akcepti en tiu ĉi momento iajn ajn plibonigojn aŭ simpligojn, eĉ la plej klarajn aŭ la plej taŭgajn. Neniu, post la Bulonja Deklaracio, povas reformi; neniu, eĉ D.<sup>ro</sup> Zamenhof. La aprobo donita de nia Majstro al la anstataŭo de *farti* por *stati* (British Esperantist, Majo 1907) estas tute nelaŭdinda. Eble—mi konsentas—la angloj ne ŝatas demandi al siaj amikoj malagrablajojn. Sed tiamaniere ni portugalingvanoj ne tradukus la verbon *conhecer* nek la substantivon *poço*, kiuj estas veraj malpuraĵoj, veraj vortaĉoj uzante la neologismon de Sr. Boirac, kio estas cetere alia reformo proponita kaj tuj uzita de la francoj, tiel, kiel la anstataŭo de ĥ per k, (*arkivo* por *arĥivo*) sen la aprobo de la Lingva Komitato. Mi kredas, ke ni bone ne agos farante specialan Esperanton por angloj aŭ francoj aŭ portugaloj, kiel la fizikverkistoj verkas librojn por scienculoj aŭ por fraŭlinoj. Esperanto estas unu sola lingvo, simpla kaj senescepta por ĉiuj.

Aliflanke ĉiuj, kiuj atente observadas, rimarkas la emon de la gramatikistoj, speciale francaj, kompliki la lingvon, verkante «sintakson» por ĝi, aranĝante «superajn kursojn», tio, kion oni bone ne komprenas por idiomo simpla kaj klara kiel Esperanto. Efektive, ni ĉiuj propagandistoj altiras la atenton de la neesperantistoj montrante la simplegecon de nia lingvo, kiu havas nur 16 regulojn; sed post la eniro en nia anaro, la aliĝinto, t. e. la fiŝo kaptita, juĝas vidi mensogon: libroj post libroj aperas nur pri gramatikaj aferoj kaj la lingvaj *malfacilaĵoj* sin prezentas.

Tamen se la libroj aperas kaj vendiĝas, tio pravas, ke multaj estas la personoj, kiuj bezonas pli klarajn lernilojn ol la

(\*) Tiu ĉi projekto estas diskutota de l' 1.<sup>a</sup> Brazila Kongreso de Esperanto.

solan Fundamenton. Ŝajnas, do, ke la Fundamento ne sufiĉas. La reformoj ekaperas; tie aŭ tie ĉi sinmontras la proponojn plimalpli bonaj kaj laŭdindaj. Kiam ili ekaperis, D.<sup>ro</sup> Zamenhof kaj la Lingva Komitato tuj malaprobis ilin, ĉar tiamaniere tre proksime, ili diras, ni ne komprenos unu la aliajn kaj novaj aliĝoj ankaŭ foriĝos pro la manko de reguleco kaj unuformeco de Esperanto.

Mi denove demandas, ĉu oni devas aŭ ne reformi la lingvon?

Ĉiuj estas pravaj. Tiuj, kiuj ne volas reformoj kaj tiuj, kiuj *volas ilin*. Ni devas, de hodiaŭ, pripensi pri ili, diskuti kiel eble plej larĝe la plibonigojn kaj plisimpligojn, sed atendi la finajn decidojn de la Lingva Komitato, (kiu estus devigata decidi ion ajn) por **uzadi** ilin.

Se ni tiel agos, ni sukcesos.

Diri, ke Esperanto estas neŝanĝebla, perfekta, estas grava eraro, kiu eble malfaciligos nian estontan prapagandon apud la naciaj registaroj. Esperanto estas jen ŝanĝebla, jen simpligebla, eĉ en ĝia gramatiko. Ĉiuj, kiuj ellernas ĝin, vidas tion.

La reformoj estas tiel malsimilaj, eĉ tiel malaj, oni diros al mi, ke oni ne povos kontentigi ĉiujn kaj sian patron. Certe mi konsentas kun tiu opinio. Sed la Lingva Komitato, kiu estas aro da diverslandaj esperantistoj, post longa aŭdado de ĉiuj pensoj kaj proponoj, decidis lastinstanĉe, kiaj estas la aprobindaj reformoj, tiuj, kiuj ne ŝanĝos la esencan de la lingvo.

Mi ekzempligu. La *j* signo de multnombro, elparolata kiel mallonga *i*, estas por ni portugalingvanoj reala malfacilaĵo. Por ni, cetere kiel por preskaŭ ĉiuj okcidentanoj, la *j* estas ĉiam elparolata kiel nia ĵ. Kial ni ne anstataŭigus ĝin por *y* aŭ por *i*. Jen estas propono. Ni, farante ĝin, povus aldoni, ke la *j* estas de longe tre malutila por la brazila propagando. Kiam la kontraŭuloj de Esperanto volas moki ĝin en la ĵurnaloj, la teatraj morrevuoj k. t. p., ili ĉiam rediras, ke la *belsona* lingvo estas belsona *ĝia-*maniere, kaj ili tiel elparolas: *la patròĵi kaj la-filóĵi*... Ĉu ĝi estas belsona?

Ni volonte proponus tian reformon al la Lingva Komitato. La L. K. diskutus ĝin longe, longege, dum unu, du, tri, multe da monatoj aŭ eĉ jaroj. Poste ĝi decidus, t. e. ĝi estus devigata decidi akceptante aŭ malakceptante la reformojn.

Tiel mi proponas :

La Brazila Kongreso de Esperanto opinias :

Art. 1.<sup>a</sup>—Reformoj por simpligi, jen la gramatiko jen la vortaro de la internacia lingvo Esperanto, estas konvenaj. Oni devas sendi ilin per la pero de naciaj kongresoj aŭ Estraj Komitatoj al la Lingva Komitato, por ke ĝi, post diskutado, aprobu aŭ malaprobu ilin.

Art. 2.<sup>a</sup>—La decidoj de la L. K. estas devigaj por la esperantistoj.

Art. 3.<sup>a</sup>—Neniu povas uzi la proponitajn reformojn antaŭ la fina decido de la Lingva Komitato.

Art. 4.<sup>a</sup> Tiu ĉi decido estos sendata al ĉiuj konataj grupoj esperantistaj, al ĵurnaloj kaj al la eminentularo de nia lingvo.

Rio de Janeiro, la 1<sup>an</sup> de Julio 1908.

EVERARDO BACKHEUSER.

---

## Kroniko

---

**O que se disse de nós** — Bem lisonjeiras têm sido as referências que a imprensa brasileira e esperantista tem feito a respeito da *Brazila Revuo Esperantista*.

Olavo Bilac, o glorioso poeta e exímio jornalista burilou na sua tão estimada secção *Registro*, na *Notícia* a seguinte crônica que com prazer reproduzimos :

«Acabo de folhear, com vivo interesse, a *Brazila Revuo Esperantista*, que já está no seu terceiro numero, e mantém assídua

correspondencia com todas as publicações esperantistas do mundo.

